



Eldonas: Cercle espérantiste de * Abono por unu jaro : 15 FF
l'Agenais, F 47340 LAROQUE * * (12 FF por Francio)
Poŝtkonto: 3 371 74 M Bordeaux * * al la ĉi-apuda pĉk.

ESPERANTO

kaj

AŬTOMATA TRADUKADO



Nuntempe, aŭtomata tradukado ne estas kontentiga solvo. Sed de nun eblas produkti per komputero tekstojn en pluraj naciaj lingvoj, uzante Esperanton por la originala.

1. Aŭtomata tradukado : Ankoraŭ ne.

La aŭtomata tradukado per komputero naskas plurajn problemojn :

- * kiel trakti esceptojn : la komputero devas havi, en sia memoro, liston de esceptoj kaj konsulti ĝin por aserti, ke la nuna frazo ne enhavas iun.
- * la analizo de la frazo kaj ĝia senco dependas de la kunteksto, t.s. ke la komputero devas kompreni proksimume la frazon antaŭ ol ĝi povas traduki ĝin. Tio estas granda malhelpo por la aŭtomata tradukado.

Mi klarigas : En esperanto, la vortoj dependas nur de la literoj. En nacia lingvo la vortoj dependas ne nur de la literoj, sed ankaŭ de la aliaj vortoj :

Ekzemple, frazo kiel en la franca :

"les poules du couvent couvent"

La sama literaro konsistigas du malsamajn vortojn, kiujn oni prononcas malsame. Oni devas analizi la frazon por scii, ke la unua "couvent" estas nomo, kaj la dua verbo.

Same, en esperanto la frazo dependas nur de la vortoj, kiuj estas en ĝi. En nacia lingvo oni devas foje kompreni aliajn frazojn por decidi pri kiuj vortoj temas. Konata ekzemplo estas en la franca :

"le pilote ferme la porte"

La vortoj povas esti tradukitaj tiel :

le = la / lin (ĝin)

pilote = piloto / pionira / pilotas

ferme = farmo / firma / fermas

la = la / ŝin (ĝin)

porte = pordo / portas.

kaj la frazo mem povas signifi :

"la piloto fermas la pordon"

"la firma piloto portas ŝin"

Plie, la idiotismoj malsimpligas la aŭtomatan tradukadon, kiu estas nuntempe tre kosta kaj ne sufiĉe kontentiga.

2. Produktado per komputero de plurlingvaj tekstoj : Jes.


Tamen, eblas produkti tekstojn en naciaj lingvoj helpe de komputero, kondiĉe ke :

- la fonta teksto estu en esperanto ;
- oni limigu sin komence al teknikaj aŭ administraciaj tekstoj, kiuj uzas simpligitan gramatikon.


La produktitaj tekstoj ne estos literaturecaj, sed kompreneblaj de iu ajn kaj eĉ sekretariino povas plibonigi la tekston, se necesas.

La produktado estas farata tiel :


Bildo 1. Tradukado el esperanto kaj el nacia lingvo.



Bildo 2. Produktado de tekstoj en pluraj lingvoj.



Ĉi tie aperas la teksto
en esperanto kaj en la
nacia lingvo de la aŭtoro
- ebligante al li kontroli
la erarojn.



Bildo 3.
Sistemo de tekst-
produktado per
komputero

La aŭtoro tajpas sian tekston, en esperanto, sur komputerterminalo*. La komputero tradukas la tekston en la nacian lingvon de la aŭtoro, kiu povas kontroli, ke la frazo havas sence. Se li uzis malfacile tradukeblajn esprimojn, tio aperas en la traduko - tiam li elektas pli simplajn vortojn aŭ esprimojn. Kiam la teksto estas kontentige tradukita en la nacian lingvon de la aŭtoro, tiam okazas la tradukado en la aliajn lingvojn.

Tio povas prezenti grandan intereson por internaciaj organizoj aŭ entreprenoj, kiuj povos tiel ŝpari multe da mono kaj da tempo, kompare al la pli tradicia solvo de homa tradukado.

3. Internacia alfabeto.

Tamen restas unu problemo por la komputera uzado de esperanto : la alfabeto.

Multaj aferoj ŝanĝiĝis de post Zamenhof. Tajpmaŝinoj aperis, kiuj ne havas la eblecon presi la ĉapelitajn literojn. La angla-usona alfabeto (t.e. latinida kaj senakcenta) estas internacie legata. Male, la supersignoj estas nacilingvaj aferoj.

Tial ke oni ne povas ŝanĝi la tajp- kaj presmaŝinojn, oni devas forigi la ĉapelitajn literojn el esperanto (anstataŭigante la ĉapelon per "h" kaj ŭ per la neuzata "w", ekzemple). Tiel la lingvo iĝos internacia ĝis en sia alfabeto - kaj tiu materia problemo ne plu malhelpos la adoptadon de la lingvo.

Ĵanseb.

* tajpmaŝino por komuniki kun la komputero.

La ĉi-supra artikolo aperas en la kadro de nia debato "Ĉu kaj kiu... estonteco por esperanto?". Ankaŭ la ĉi-posta kontribuo de

Suzana : K I E L I Z O L I T O fariĝis E - I S T O

Eble estus interese por la legantoj scii kiel izolito fariĝis esperantisto. Jen. Inter la du militoj mi legis informojn pri E en anarkiistaj gazetoj, kiujn mia patro ricevis.

Mi dezirus lerni ĝin, sed ni loĝas en malgranda urbeto kaj neniu enloĝanto konas E-on. Plie, pro la ricevita edukado kaj la epoko, rilati kun nekonatoj estis preskaŭ neimageble.

Ĉe la fino de la lasta milito, mi loĝis dum kvar monatoj en Tuluzo. Kunluantoj estis esperantistoj. Tuj mi kaptis la okazon! Ili havigis al mi la lernolibron kaj ilia bofrato, loĝanta en Bordojo, korektis miajn taskojn. Mi sendis miajn taskojn po 5 lecionoj. Mia kursgvidanto korektis ilin, same kiel oni korektus ortografiajn erarojn, en letero. Antaŭ la lastaj 5 lecionoj, mia kursgvidanto malsaniĝis, tiam oni donis al mi alian. Li skribis al mi: "Mi bedaŭras tian metodon de kursgvidado; mi konsilas vin rekomenci la lernadon". Li donis al mi klarigojn pri la konvena maniero prezenti miajn taskojn. Ĉar mi havis ĉe la koro la idealon, kiu instigis min lerni E-on, mi rekomencis la lernadon. Tiam, mi komparis la du metodojn. Leciono post leciono, en marĝeno, multaj klarigoj, eĉ desegnaĵoj pri la akuzativo de movo. Tio okazis en la jaro 1951a. Mi partoprenis en 1954 E-renkonton en Tuluzo; por la unua fojo mi ekkonis la E-medion. 1955, mi ekrespondis kun la kvar esperantistinoj, kiuj respondis mian anoncon. Ankoraŭ ni korespondas! 1957, mi partoprenis mian unuan internacian Kongreson. Ĝis 1964 mi partoprenis plurajn Kongresojn. Ĉiam mi tre ĝuis la fratecan etoson de E-kongresoj aŭ renkontoj. La izolito, la solulo, kiu mi estas trovis bonegajn geamikojn, kies amikeco varmigis mian koron. La korespondado ebligas naskigi Amikecon, kun majuskla litero.

Esperanto naskas amikecon trans limoj; tia amikeco estas plej kortuŝa. Eksterlandaj geamikoj pruvis al mi la forton de tiu sento per grava amikaĵo. Ni korespondas de antaŭ 17 jaroj! La korespondado estas la plej bona rimedo por interkonatiĝi. Bedaŭrinde, la plimulto de niaj samtempuloj ne ŝatas skribi leterojn.

Poste, mi restis 11 jarojn, ĉiam hejme. Sed, per mia korespondado miaj geamikoj en la Mondo ofte "ĉeestas", same kiel hodiaŭ mi estas kun miaj geamikoj de "Laŭte!". Kvankam la kvartalo kaj la domo estas silentaj, mi ne sentas mian solecon. Kiel okazas al multaj homoj, malagrablajoj, eĉ ĉagrenoj, trafis min dum mia vivo... Dank'al mia idealo, dank'al Esperanto, mi eltenis ilin, mi eltenas mian solecon... la vivon. Antaŭ 5 jaroj, letere, mi interrilatis kun SAT-ano. Ni estas samopiniantoj. Tio instigis min partopreni la kongreson en Lekturo. Denove, mi eniras la E-medion. Plie, mi, iomete, kontribuas artikolojn en "Laŭte!".

Tio donas al mi la impreson vivi, tio estas, servi al aliaj. "Laŭte!" permesas dialogon inter la legantaro. Por izolito tio estas plia ligilo.

Amikeco riĉigas la vivon. Esperanto ankaŭ ĝin riĉigas!
Kiom mi ŝuldas al Esperanto! Suzana.

Pliaj kontribuoj pri

Ĉ U kaj K I U ...

ESTONTECO por ESPERANTO ?

Marc NOEL : Ĉu estonteco por Esperanto? alidire, ĉu E iam ludos la rolon de internacia lingvo, anstataŭ tiuj lingvoj, kiuj hodiaŭ provas, pli-malpli sukcese, plenumi tiun funkcion?

Por respondi tiun ĉi demandon, necesas difini per kio E malsimilas al aliaj naturaj lingvoj. Oni jam ofte aludis pri la facileco de E kaj ties neŭtraleco: mi do ne bezonas refoje trakti tiujn punktojn.

Krom tio, E prezentas, laŭ mi, apartan avantaĝon sur la kampo de la instru-metodoj. Mi tuj klarigos:

Se rezoni teorie, ĉiu ajn lingvo povus roli kiel internacia lingvo: ĉio dependas de la rimedoj, kiujn oni pretas, aŭ povas, utiligi tiucele. Al infaneto, neniu lingvo ŝajnas pli malfacila ol alia: la malfacilaĵoj propraj al ĉiu lingvo aperas nur al plenkreskulo.

En la 16a jarcento, MONTAIGNE, jam en la infanaĝo, ellernis la latinan lingvon, kaj li priskribis sian sperton: "...Jen la solvo, kiun trovis mia patro: Ĉe la nutristino, antaŭ la malligo de mia lango, li konfidis min al iu Germano, nun jam de pluraj jaroj mortinta, fama medicinisto en Francio, kiu tute ne scipovis nian lingvon, sed estis spertulo pri la latina. Tiu ĉi, kiun mia patro venigis intence, kaj kiu estis multekoste pagita, tenis min la tutan tagon inter siaj bra-

koj. Ankoraŭ estis du aliaj, malpli kleraj, por min prizorgi kaj helpi la unuan. Tiu alparolis min en neniu alia lingvo ol la latina... Jam pli ol sesjara, mi ne pli scipovis da franca aŭ perigorda lingvo, ol da araba. Kaj sen artifiko, sen libro, sen gramatiko nek regulo, sen vipo nek larmoj, mi estis lerninta la latinan lingvon, tiel puran kiel uzis ĝin mia instruisto."

Kompreneble, tiu aparta metodo ne estas ĝeneraligebla, sed tiu ekzemplo pruvas, ke la lingvo-lernado estas multe pli facila dum la infanaĝo, ol kelkajn jarojn poste. (Tio ankaŭ validas por aliaj fakoj, muziko ekzemple). Tiu mirinda lingva lernkapablo malaperas rapide ekde la aĝo de 7 aŭ 8 jaroj, nome, kiam la infano jam sufiĉe bone uzas sian gepatran lingvon.

Kial perdiĝas tiu kapablo? Laŭ mi, estas tri kaŭzoj:

- Unue, ĉar la lernado de la gepatra lingvo okazas sur "virga tereno", kie neniu antaŭa "lingva akiraĵo" ebligas malfacilajn komparojn.
- Due, ĉar je la aĝo de 7 aŭ 8 jaroj, la cerbo jam ĉesas disvolviĝi.
- Trie, ĉar por la infaneto, lingvo estas nur komunikilo, sen iu ajn kroma kultura aŭ afekcia enhavo; konsekvence, ekde la momento kiam li sufiĉe bone scipovas sian gepatran lingvon, kaj per ĝi kapablas komuniki kun aliaj personoj, li perdas la bezonon lerni aliajn lingvojn. Por konvinki lin pri la utileco de fremdaj lingvoj, kaj instigi lin lerni, estas necese, ke li havu la okazon ekzerciĝi en la lingvo, praktikante ĝin kun ties parolantoj. Tial, oftaj kaj daŭraj restadoj en fremdaj landoj (aŭ ĉiutaga miksiĝo, en la propra lando, kun fremduloj) estas la nepre kondiĉo por lernigi lingvon, eĉ al junuloj. Tiucele ekzistas jam de pluraj jaroj en Francio kelkaj "Eŭropaj lernejoj" (la plej fama, franc-germana, situas en Strasburgo), kie la gelernantoj miksiĝas kaj lernas kune. Sed tiu avangarda metodo, same kiel la sperto de Montaigne, evidente ne estas ĝeneraligebla. Se, supoze, la angla

lingvo estus elektita kiel internacia lingvo, estas kompreneble, ke la metodo de la Eŭropaj lernejoj, sendube la sola efika metodo, ne povus aplikiĝi al ĉiuj lernantoj de Eŭropo (se ne paroli pri ekstereŭropaj lernantoj!), almenaŭ pro distancaj obstakloj.

Sed, tio ĉi dirite, kiujn avantaĝojn montras Esperanto, rilate al aliaj lingvoj, sur ĉi tiu pedagogia tereno? E estas nur lingvo, kaj obeas la samajn regulojn kiel la aliaj lingvoj; sed jen la grava avantaĝo de E: Dum la ĉiutaga miksiĝo kun fremduloj, nepre necesa faktoro por la akiro de lingva scipovo, estas tute neebla por la plej granda parto de la homaro, tiu ĉiutaga trejnado iĝas ebla kun E: estas tute egale, ĉu oni uzas E-on kun japano, italo, anglo, germano, ktp, ĉar la lingvo estas universala, kaj ne dependas de iu difinita popolo. Tio grandege faciligas la lernadon de la lingvo, ĉar tio ebligas la ĝeneraligon de la instruado laŭ la metodoj de "Eŭropaj lernejoj". Esperanto estas sendube la sola lingvo kies instruado povus esti ĝenerala farita laŭ tiu plej efika metodo. Oni iam en la estonteco devos pripensi tion, kaj evidentigos, ke E estas la sola eblo.

Mi opinias, ke ni devas fidi la estontecon.

Patriko: Ŝajnas al mi, ke respondi la demandon estas klarigi kiel povus E esti akceptata kiel internacia helpa lingvo kaj uzata kiel tia kaj de tiu vidpunkto, Mark ne tiklis la kernon de la problemo. Ni E-istoj jam estimas E-on kaj jam fidas ĝin kaj ties taŭgecon kiel helpa lingvo, do ripeti la jam de ni konatajn argumentojn aspektas al mi kvazaŭ mensa masturbado. Li prave aludis la lernan kaj lernejan problemojn, ĉar ni devas diskuti por eltrovi rimedojn cele al plej taŭga lernado kaj instruado de E, kvankam tiuj problemoj ne ŝajnas al mi plej grava afero nek plena respondo al estonteco de Esperanto.

Eĉ se oni sukcesus post diskuto konvinki (kaj kion signifas la vorto?) plimulton da homoj, eĉ

se oni sendus plimulton da infanoj ĉiulandaj al E-kursoj, mi tamen dubus pri uzatiĝo de E kiel internacia lingvo...

Kompreneble, homo ne estas roboto kaj homo neniam plenracie sintenis kaj mi timas (kaj "timi" estas nur stilesprimo), ke li neniam tion faros. Nia sinteno restas grandaparte senkonscia kaj se ni povas (malfacile) gvidi ĝin, ni certe ne povas kontroli kaj mastri ĝin.

Pro tio ni ne parolu teorie pri pravo, konvinko kaj venko, sed prefere ni praktike parolu pri dubo, sperto kaj efiko. Ni ne diru "E estas belsona kaj neŭtrala kaj facila, por la tuta mond' utila kaj cetere..." Sed ni pruvu tion per praktikado kaj internacia utiligo de la lingvo.

Ni ne prezentu E-on kiel superlingvon genie elpensitan de superhomo bonkora kaj virtama, kies nomon oni plurfoje uzis por bapti stratojn ĉie ajn en la mondo.

Ni plibone prezentu ĝin pere de tio, kion ni faras dank'al ĝi, konsentante ke ni povus erari, kvankam nia sperto konfirmadas nian opinion.

Saĝo ne estas ĉion koni, sed koni, ke ni ne ĉion konas. Alie ni riskas fari, ke E aspektos al la plimultaj nur mensa ludo por intelektula minoritato jam kulture privilegiita.

Kompreneble, tiu, kiu ne praktike utiligas la lingvon, ne facile sukcesos propagandi pri ties avantaĝoj. Sed se, kontraŭe, alparolante al ekologiularo, li atestas pri praktikaj kontribuoj al ekologiaj luktoj far' esperantistoj kaj per E, tiam kaj nur tiam ne plu estos eĉ unu el tiuj ekologiuloj por malestimi E-on. La fundamenta punkto estas, por ni, ke E estas nur ILO, kies valoro dependas nur de tio pozitiva, pro kio ĝi utilas al ni.

Tiacele, nia sinteno apartiĝu kaj malsamiĝu de tiu de la t.n. neŭtraluloj kaj ankaŭ de tiuj aliaj, kies celoj pli-malpli sinkaŝe malsamas kun niaj.

Sed alia fundamenta punkto estas ke kibn ni diras kaj opinias, tio plej ofte malpli gravas ol la ma-

niero diri kaj opinii kaj E ŝajnas al mi plej taŭgi por pli malfermaj kaj pli proksimiĝaj rilatoj inter individuoj eksteren de la kutimaj mensaj baroj ĉiuspecaj kaj pri rasoj kaj pri nacioj kaj pri klasoj, pri ĉiuj opinioj pli-malpli antaŭjuĝaj aŭ religiaj aŭ politikaj kaj eĉ pri seksoj.

Ĉar ĉu ne estu E lingvo de esploremaĵ liberigi-uloj sen timoj nek trudoj nek certoj ?!

Nicole : Ĉu estonteco por Esperanto ? - Jes, se tiuj, kiuj havas avantaĝojn ĝin praktiki iĝas E-istoj, bone konsciante la valoregan rimedon, kiu estas esperanto !

Ĉar, kiuj bezonas E-on ? Ne la multnaciaj societoj riĉegaj, nek la riĉuloj, kiuj regas, nek la estraro, kiu premas. Ili havas proprajn kaj efikajn rimedojn kaj organizojn por rilati mondscale, por sin protekti (laŭ ekonomiaj kaj politikaj vidpunktoj).

Jen la problemo : kiel oni konscias pri la internacieco de la homaraj problemoj ? Kiel oni sentas emon al internaciaj interŝanĝoj ? Kiel oni konscias la neceson uzi internacian lingvon ?

Multaj homoj suferas pro tro laciga, tro stulta vivo ; la tuttagaj malfacilaĵoj superŝutas ilin, ili povas interesiĝi nur pri propraj aŭ urĝaj aferoj. Sed, kial la diversaj asocioj, organizoj, individuoj, kiuj celas pliboniĝon de la tuttaga popola vivo, kiuj konscias pri la solidareco inter la diversaj landoj, kial ili ne ĉiuj esperantistiĝas, por ŝpari tempon, monon, por faciligi sian laboron ?

Laŭ mia opinio, pro ne sciigo pri E, pro kulturaj antaŭjuĝoj, pro malaktivemo... Ankaŭ tro multaj el la E-istoj ne sufiĉe pravas kiom utilas E al ili en ilia vivo, kian plezuron, kiajn avantaĝojn ili povas ĝui uzante la internacian lingvon.

Pli ol la longaj, eĉ lertaj paroladoj pri E, efikas la konkretaj agadoj, ĉu en edukistaj, pacistaj, ekologiaj, internaciaj renkontiĝoj. Ekzemple : Okaze de la RIDEF en Landerneau (Internacia

Renkontiĝo de Freinet-Edukistoj) ĉi-jare, necesis uzi E-on por nur unu pola kamarado; pro tio, dank' al li, multaj aŭdis E-on unuafoje kaj miris pri la utilo de la lingvo, spertis, ke ĝi estas viva lingvo, kaj ekinteresiĝas pri ĝi.

Por ke estu estonteco al E, ni pruvu kiom nuntempe ĝi bone funkcias ! Longdaŭra laboro, sed necesa... atendente la glorplenajn tagojn, la E-istoj devas kiel eble plej ofte uzi E-on, agi por ke okazu E-kurso en diversaj lokoj (lernejoj, kulturaj domoj, kluboj, laboristaj asocioj) kaj doni informojn pri E en la medioj, en kiuj lingvaj problemoj aperas, kaj ĉe individuoj, kiuj emas al honoraj rilatoj sen rasaj antaŭjuĝoj, kiuj serĉas pli bone kompreni, pli bone ĝui la vivon.

J.G. : Ĉu estonteco por Esperanto ? - Se oni celas "Unu homaro, Unu lingvo!", mia vidpunkto estas ne !

Mi opinias, ke E povas tamen ludi rolon en nia mondo de kontraŭdiroj !

Efektive, oni vidas disiĝon de la Mondo en du imperiismaj influ-zonoj :

Unue : Tiu de la Okcidento kun la superrego ekonomia kaj kultura de Usono kun unuformiĝo de la vivmaniero (konsumsocio, ktp... kaj la angla kiel lingvo de la aferoj, de la internaciaj rilatoj.

Due : Tiu de la Oriento kun la superrego de Sovetio, kiu kunportas la devigan lernadon de la rusa lingvo kun ankaŭ unuformiĝo de la vivmaniero (ĉiuj funkciuloj de la ŝtato, kiuj mastras la tutan vivon!)

Ĉinio, kiu dum certa tempo sekvis iom apartan vojon, nun serĉas sintezon inter la ŝtat-kolektivismo kaj la malfermo al Okcidento. Ankaŭ la Tria Mondo estas ligita al unu aŭ al la alia bloko.

Sajnas unuavide la situacio senespera fronte al tiuj potencoj kaj Esperanto sen estonteco. Sed samtempe kiel oni ĉeestas tiun unuformiĝon de la homaro trudatan de la diversaj imperiismoj, ĉi en la mondo ekstaras la ribelo de la malplimultoj: - ĉu seksaj (virinaj kaj samseksemulaj luktoj) ;

- ĉu rasaj (nigruloj de Usono aŭ de Sudafriko);
- ĉu etnaj (Kurdoj en diversaj landoj de Mezoriento, Indianoj de Usono, kiuj kreis lernejojn por vivtenigi sian vivmanieron, Vaskoj kun la Ikastola, Kanakoj de Nov-Kaledonio, Bretonoj, Okcitanoj, ktp) ;
- ĉu ekologia por la pluvivo de la mondo.

La lukto de tiuj diversaj malplimultoj por la respekto al iliaj malsimilecoj, kiu okazas internacie, bezonas neimperiisman interkomprenilon, kaj tie Esperanto povus ludi rolon. Jam la Freinet-movado tion komprenis kaj la Bretonoj provis tiun alpaŝon. Oni povas jam rimarki, ke E disvolviĝis precipe en landoj de malplimultaj lingvoj : Nederlando, Bulgario, Japanio, Brazilio, ktp. Esperanto kiel ilo de defendo de la lingvoj kaj kulturoj, kiuj provas pluvivi en la tuta mondo fronte al la unuformiĝo de la homaro, jen, laŭ mi, ebla estonteco de Esperanto.

La broŝurservo : La Juna Penso, F 4734 Laroque Timbaut,
poŝtkonto : 3374 04M Bordeaux

ofertas al vi por 1980 jenajn tekstojn :

- * Katastrofplano por Fessenheim. Verdikto pri Wyhl 5 FF
- * Sindikatismo - Sovetoj (Anton Pannekoek) 3 FF
- * Kontraŭflue (Valo) - El la kara infaneco (Valo) ĉiu 8 FF
- * La blankaj gardistoj (Heiligstein) por geknaboj 5 FF
- * Argentina novelaro (dua kolekto) 5 FF

jenajn varbbroŝurojn en la franca:

- * Esperanto or English ? (H.Masson) 6 FF
- * Initiation à l'espéranto (An Kaŭ) 3 FF
- * Espéranto de poche (25FF por 10 ekzempleroj) 3 FF

(La afranko estas inkluzivita por minimume 25-franka mendo)

Por ke ĉiu abonanto de "Laŭte!" sciu, ĉu lia/ŝia abono finiĝis aŭ plu daŭras, sur la lasta paĝo, apud ĉies adreso, troviĝas la mencio :

Via abono estas finita
aŭ ,, ,, (ne finita)

Bonvolu atenti ĝin ! Dankon.

La venonta numero aperos fine de decembro 1979

 * A R M A D O *
 * kaj M A L S A T O *

I. 24 Horoj en Eŭropo pri armado kaj malsato en la mondo

Okaze de la dua kunsido de la asembleo de la Eŭropa Komunumo, kiu debatos pri armilindustrio en la 9 landoj de la komunumo, kaj por subteni la senliman malsatstrikon de Marco PANELLA kaj de alia itala radikala deputito de tiu asembleo, estis organizitaj la 22an kaj 23an de septembro en Strasburgo "24 horoj en Eŭropo pri armado kaj malsato en la mondo".

Raporto pri la debatoj

Unua grupo Tiu grupo konstatis la regadon de armeoj, ekzemple pri la kreditoj por scienca esplorado, kaj la kreskantantan produktadon de armiloj. Ĝi proponas transformi la portilitajn elspezojn al helpo al la Tria Mondo, t.e. :

- ekonomia helpo, nutra helpo, teknika helpo.
 Por atingi tiun celon, informado devas provi konsciigi la publikan opinion, kaj la helpo al la Tria Mondo ne plu devos resti afero de nacia prestiĝo.

Dua grupo Tiu grupo konstatis, ke por la armilkomerco oni argumentas, ke armilojn petas la registaroj de la Tria Mondo, kaj ke tio alportas al la industriaj landoj ekonomian profiton kaj al la laborista klaso laborpostenojn. Oni vendas ne nur armilojn, sed ankaŭ uzinojn por armilproduktado. La publika opinio estas, ke armilkomerco estas neevitebla kaj, malgraŭ protestagadoj, duono de la produkto de armiloj de Francio estas destinata al eksportado. En 1976, la sumo destinata de Francio al la helpo al la Tria Mondo estis 0,65 % de la kruda nacia produkto, sed nur 0,35 %, se oni ne enkalkulas francajn koloniojn. En tiuj 0,35 % estas enkalkulita la militista helpo.

La grupo opinias, ke ne estas prava la argumento, ke armilproduktado kreas laborpostenojn, ĉar transformo de tiu industrio al civila industrio kreas pli da postenoj. Sed ne nur per armiloj oni malŝparas monon, ankaŭ por aliaj neutilaj aferoj, ekzemple por reklamado, aŭ pro malbona medicino.

Ĝenerala diskuto pri la raportoj de tiuj du grupoj Brice Lalonde

diras, ke la aserto, ke la socio estas pli kaj pli militarista, estas malvera. Li klarigas, ke la armeoj estas nun kadukaj, ĉar por la venontaj militoj disponeblas nun ekologiaj, biologiaj, meteorologiaj kaj aliaj deturrimedoj. Jean Fabre kaj multaj aliaj opinias, ke tamen estas reala la militistiĝo de la socio. Kamaradino opinias, ke rimedoj por lukti kontraŭ armado kaj ekspluatado de la Tria Mondo estas civila malobeado kaj bojkoto. Kamarado atentigas pri la danĝereco de la koncepto pri transdono de okcidenta teknologio al la Tria Mondo. Alia kamarado atentigas pri la diferencoj, kiuj ekzistas inter la landoj de la Tria Mondo, ekzemple inter la landoj, kiuj eksportas petrolon kaj pli malriĉaj landoj, aŭ inter la politikaj reĝimoj. Oni timas, ke la mono, per kiu oni volas helpi al popoloj, restus en la poŝoj de registoj. Kamarado bedaŭras, ke ne partoprenas en la debatoj reprezentantoj de la Tria Mondo, sed estis tro malfacile tion organizi, kaj pluraj personoj, kiuj partoprenis en la diskutoj, aktivis kune kun homoj de la Tria Mondo.

Grupo studinta agadojn al la eŭropa asembleo Tiu grupo :

- memorigas, ke la asembleo devas diskuti merkredon la 26an de septembro 1979 pri la maniero stimuli la eŭropan industrion disvolvante la armilindustrion, kaj proponas redakti tekston pri tio. Rezolucio estas verkita de la partoprenantoj en tiuj "24 horoj", ĝia traduko estos sendata al "Laŭte" tuj, kiam Jakelino havos la originalan tekston.
- proponas uzi la servojn de la itala radikala deputito, por ke ili proponu al la asembleo helpi al la Tria Mondo per esplorado, eksperimentado, stabiligado de la kurzo de la eksportitaj varoj, transformado de la armilindustrio.
- proponas, ke la ekologia grupo de la asembleo de la Eŭropa Komunumo uzu la 7 minutojn, kiujn ĝi havos por paroli pri la buĝeto, petante, ke ĉiu lando dediĉu 1 % de la kruda nacia produkto al helpo al la Tria Mondo.

Muzikvespero

Por konigi la renkonton al la strasburganoj, estis organizita la 22an de septembro muzikvespero.

Jean FABRE, ĝenerala sekretario de Partio Radikala, via di torre argentina 18, ROMO, Italio, enkondukis la vesperon, informante la publikon, ke senemocie enkalkulita en la statistikoj de UNO estas la morto, inter la 1a de januaro kaj

la 31a de decembro 1979, de 50 000 000 da homoj (proksimume la loĝantaro de Francio), inter kiuj 17 000 000 da infanoj, ke necesus por ilin savi 85 000 000 da francaj frankoj tage, sed ke elspeziĝas tage 5 760 000 da francaj frankoj por armado, kaj ke, konsekvence, mortos antaŭ noktomezo hodiaŭ 46 575 infanoj, inter kiuj 9 600 aĝas malpli ol 5 jarojn.

Kvankam de pluraj jaroj li estas serĉata de la franca polico pro sia rifuzo soldatiĝi, Jean FABRE sukcesis ne esti arestita. Georges MOUSTAKI kantis senpage por tiu renkonto. Mi povis konstati ke, krom tiuj, kiujn oni povas aŭdi ĉe la francaj radioj, li havas tre bonajn kantojn. Mi aparte ŝatis tiun, en kiu li aludas pri seksperforto, kiel unu el la tre maloftaj inteligentaj tekstoj, kiujn mi povis ekkoni pri tiu temo de post mia propra seksperfortiĝo. (Verŝajne tial tiu kanto estis malpli aplaudata en la salono ol aliaj...). MOUSTAKI finis sian parton de la programo invitante la publikon kunkanti la baladon de Sacco kaj Vanzetti omaĝe al Pierre GOLDMANN, ĵus murdita de faŝistoj en Parizo.

Post la kantado intervenis pluraj personoj :

- François ROUX, advokato de la kamparanoj de Larzako, rakontis la proceson de 7 polineziaj junuloj, kiuj, malgraŭ lia defendo, estis kondamnitaj al 20 jaroj da trudlaboro ĉe la asiza tribunalo de Papeete pro perarmila ribelo kontraŭ la Franca Respubliko. Li alvokis la francajn civitanojn resendi siajn soldatlibretojn kaj rifuzi porarmeajn impostojn, sed ankaŭ ekkoni kaj uzi la leĝajn eblojn, kiuj ekzistas en, diras li, ankoraŭ demokrataj landoj.
- Esther PETER DAVIS, 6 rue d'Arras, F 67000 STRASBOURG, kiel virino por paco, malleĝe alvokis la francajn patrinon informi siajn filojn pri ilia leĝa rajto anstataŭigi soldatservon per civila servo. (*)

*) Noto por neinicitoj : Franca junulo rajtas uzi la francan leĝon pri soldatservrifuzo por anstataŭigi soldatservon per civila servo, sed neniu rajtas informi francan junulon, ke ekzistas leĝo pri soldatservrifuzo en Francio.

Tiuj, kiuj ne komprenis, estas petataj konigi sian nekomprenon al : M. le ministre de la Défense, 14 rue Saint Dominique, F 75007 Paris (senpaga afranko interne de Francŝtatio).

Abonantoj de "Laŭte" por 1979 : tiu ĉi estas la lasta n° de via abono. Frua reabono helpas !

- Thierry JEANTET, 195 bd Saint-Germain, 75007 PARIS, esprimis la solidarecon de MRG (franca movado de maldekstraj radikaluloj) - (NB : partoprenis en la renkonto ankaŭ s-roj Zeller, deputito de la majoritato, kaj Marc BRUNSCHWEILER, socialista deputito).

Poste, la popolmuzika grupo de la strato de pontoj en Strasburgo dancigis la postvivantojn.

Kompleta listo de la budoj

- Pacista Frakcio de SAT, aktiva membro en Germanio :
Jacqueline LEPEIX, 82 avenue Jean Jaurès, F 67100 STRASBOURG
- Movado Popola de la Civitanoj de l'Mondo, 3 bis rue de la Sous-Préfecture, F 39200 SAINT CLAUDE
- Movado por Alternativo Neperforta, 20 rue du Dévidet, F 45200 MONTARGIS.
- Aide à Toute Détresse - Quart Monde (movado por helpo al mizeruloj en la industriaj landoj), 122 avenue du général Leclerc, F 95480 PIERRELAYE
- PSU (franca partio socialista unuigita)
- virinoj por paco
- Radio Verda Fessenheim, ĉe Gilles kaj Marie-Jeanne GAY, Bât. D, rue des Tulipes, F 67150 GERSTHEIM
- MDPL (Movado por malarmado, paco kaj libereco), B.P.n°2135, F 34036 MONTPELLIER
- SOS Sahel, 7 rue de Nungesser, F 30000 TROYES
- strasburga grupo de soldatservrifuzantoj (adreson peras Jakelino)
- Artisans du Monde (butikoj, kiu vendas produktojn el la Tria Mondo), 30 rue du Vieil Hôpital, F 67000 STRASBOURG
- komitato de solidaro al la lukto de la polinezia popolo kontraŭ la franca koloniismo, ĉe la grupo de esplorado kaj agado neperforta, GRANV, 15 rue du Palais, F 29000 QUIMPER, Bretonio.

Filmoj kaj sonoraj-lumbildaj muntaĵoj montritaj dum la renkonto.

- "Ni laborigu la sunon", komerca filmo pri vendado de sun-energiaj pumpiloj al la Tria Mondo. Ekologiista kamarado kritikis, ke eksporti okcidentan teknologion ne estas la plej bona maniero helpi la Trian Mondon.
- sonora-lumbilda muntaĵo pri ŝipo FRI, kiu iris sur la Pacifikan Oceanon por protesti kontraŭ la eksperimentado

de la franca atombombo sur la koloniitaj insuloj de Polinezio, estis piratata de la franca armeo sur internacia akvo, kaj poste vizitis popolojn viktimaĵn de la diversnaciaj atombomboj. - sonora-lumbilda muntaĵo realigita de PSU por informi lernantojn pri Sahelo. Du instruistoj opiniis la muntaĵon bona, ĉar ĝi prezentas la kulturon de sahelaj popoloj. (lingva noto : la vorto Sahelo ne troviĝas en PIV. Temas pri la regiono, kiu bordas la dezerton Saharo, kaj kie regas nun grandega sekeco).

Apartaj intervenoj

- aktivantino de la hagenau-a sekcio de ATD - Quart Monde atentigas, ke mizero ekzistas ne nur en la Tria Mondo, sed ankaŭ en la okcidenta socio, kaj priskribas la situacion de kelkaj familioj, kiuj vivaĉas en la arbaro de Haguenau (Malalta Elzaco*).
- kamaradino legas leteron de Pierre MARCHAND pri mizero en Bengalo Libera.
- la grupo Paul-Emile VICTOR kaj Jean GOSS, de la Movado Internacia por Repacigado (anglalingve IFOR) sendis telegramojn por esprimi sian solidarecon.
- Jean PIGNERO, de la movado kontraŭ atomradioj, esprimas sian malsolidarecon al Europe-Ecologie.
- Thérèse MERCY, 79 avenue Miribel, F 55100 VERDUN, zorgas pri solidaragado kun la indianoj de la peruaj altebenejoj : la indianoj ŝatus interŝanĝi la produktojn de sia metiado por krudmaterialoj kaj iloj.

Bilanco

La renkonto ne allogis grandan publikon, interalie pro la silento de la plej legata ĵurnalo en Strasburgo "Dernières Nouvelles d'Alsace". Pro striko, la elzacaj ĵurnaloj ne aperis sabaton la 22an de septembro. Tamen, dum la tuta semajno "Nouvel Alsacien", kiu bedaŭrinde estas malpli legata katolika ĵurnalo, aperigis plurajn komunikojn de la organizantoj de tiu renkonto, dum "Dernières Nouvelles" kontentiĝis per aperigo en sia dimanĉa eldono de artikolo cetero malfavora al pacismo. Tamen, ĝenerala estas la senintereso de strasburganoj pri politiko, kaj la hasteco, kun kiu tiu renkonto estis preparita, ne ebligis skui tiun kutiman apation. Ankaŭ pro la manko de tempo, multaj asocioj,

* Elzaco = Alzaco (laŭ PIV, p.233, sed la vorto "Alzaco" mankas en la sama PIV ! red.)

kiuj ŝatus partopreni, kaj subtenis la renkonton, ne povis veni, aŭ povis sendi nur malgrandan delegitaron. Tamen tiu renkonto kreis kontaktojn kaj ĝi estas pozitiva, se ĝi estos nur komenco. En Strasburgo, la aktivantoj provas organizi ion pri la temo de armado kaj malsato en la mondo, kontaktadreso por tio estas tiu de Esther PETER DAVIS.

II. Nia malgastronomia rubriko

Philippe LHERMITTE, arestita pro soldatservrifuzo, malsatstrikas ekde la fino de aŭgusto en Lille.
Domenico COLAMARINO, arestita en novembro 1978 kaj liberigita post 48 tagoj da malsatstriko, estis kunvokita la 18an de septembro 1979 al la armea tribunalo de Lille por esti juĝata pro soldatiĝrifuzo kaj oberifuzo. Li riskis du jarojn da mallibero, sed mi ne konas la verdikton.
Informas pri ambaŭ kamaradoj : Françoise DUBOIS, 81 rue Palissy, F 59800 LILLE FIVES.

III. Armerifuzantinoj

Pli kaj pli da kamaradinoj konsciiĝas, ke ankaŭ ili havas sian rolon por ludi en la kontraŭmilitista lukto. Grupo de armerifuzantinoj organiziĝas en Lille (Nordfrancio).
Interne de la Internacio de Militrezistantoj, zorgas pri tio Bernadette RIDARD, kiu havas du adresojn :
ĉe WRI
Van Elewijck strato 35
BRUSELO, Belgio
Methfesselstri 69
D 2000 HAMBURG 19
Federacia Germanio.

IV. Amnestio Internacia

La franca kaj aliaj naciaj sekcioj de Amnestio Internacia estas nun organizantaj informkampanjon pri la situacio de soldatservrifuzantoj en pluraj landoj de Okcidenta Eŭropo.

Paciste moŝtas en Germanio : Jakelino.

"Peuples noirs, peuples africains" 3, r.de l'Asile Popincourt, estas revuo pri afrikaj problemoj, kies direktoro estas grava verkisto kameruna, Mongo Beri, aŭtoro de interesaj libroj pri Afriko : "Main basse sur le Cameroun" "Remember Ruben" "Perpetue, ville cruelle" "Le pauvre Christ de Bomba", ktp...

Nia felietono : TRA LA MONDO PER BICIKLO ...

Post tranoktado ĉe la kamparanoj, mi petas de ili helpe de vortaro konsilon pri la vojo sekvota. Ili komprenigas, ke nun la montaro restos neĝoplana dum almenaŭ du monatoj, ke mi ne povos transpasi, do ke estas pli prudente, ke mi revenu al Novorossisk. (...) Je la 13a mi estas ĉe kdo Mialet, kiun mia reveno tute ne surprizas. Efektive, la tutan tagon la vetero estas aĉega, la vento, la fama "Nordost", kaj la neĝo aperas.

Mi devas viziti la oficejon de la fremduloj, kie vole nevole oni plu validigas mian vizon je kelkaj tagoj. Same, oni repro-mesas al mi loĝlokon kaj manĝon ĉe mia antaŭa loĝejo, lernejo por junhomoj. Oni kondukas min al la Sindikata Unuiĝo por peti laboron. En la ĉambrego jam 200 senlaboruloj atendas, kio pensigas min, ke ankaŭ mi devos sufiĉe longe atendi laboron. Fakte, nur morgaŭ oni povos definitive respondi al mi.

Vendredon 7an de februaro 1929 :

Oni aludas pri laboro por mi kiel lignaĵisto en Autopromptorg (kie oni produktas kaj riparas veturilan materialon). Plej malfacile estas akiri sindikatan karton, kiu, ĉi tie, solvas multajn formalaĵojn kaj havigas rajtojn nekonatajn en Francio, nome rabaton en la trajnoj, la spektakloj, avantaĝojn okaze de malsano, senlaboro, ktp... Kune kun la karto oni donas al mi 3 rublojn... Kompreneble, ĉio ĉi ne multe plaĉas al mi, sed tio ebligas al mi pacienci kaj ne tro pensi pri la malvarmo (inter - 16° kaj - 18°). La tuta haveno estas blokita per la glacio, kiun kovras neĝotapiŝo. Pluraj ŝipoj estas tiel senmovigitaj en la glacio. (...)

De la 12a de februaro mi laboras en Autopromptorg. La laboro - nova por mi - interesas min : kiel lignaĵisto mi zorgas pri aranĝado kaj karoserioj de aŭtobusoj (...)

Dimanĉon 7an de aprilo '29 :

Hodiaŭ estas "granda" tago por mi post sufiĉe intensa semajno. Hodiaŭ, ricevinte mian salajron, mi forlasis la laborojn. Mi lastfoje vizitis miajn esperantistajn kdojn Antipov kaj Kagnebski. Kdo A. volis, ke junulino akompanu min kaj tiucele prezentis du aŭ tri al mi. Tio estis ĉefe frivola preteksto por tre agrabla familia vespero montranta ĉarmoplenan aspekton de la rusa gastamo, ĉar, kompreneble, oni amuziĝis kaj dancis.

A D R E S A R O komuna al abonantaro de
"L'Éclair" - Dua suplemento - Nov. 1979 .

Novaĵ adresoj

A N D O R O

- Castello Robert
C. Alzinaret, 2
ANDORRA LA VELLA
(14, emerito)

- Matiland Frank
78 Saxon Road
HASTINGS
East Sussex
F R A N C I O

B E L G I O

- Jeannart Willy
Rte d'Éghezée, 8
5850 BOVESSE
(46, adm. sekr.)
ŝ: natuŝismo, Zen
Krismanurtti-fil.

* Vivara Stelo
Ch. de Baza
22210 PLENET

+ De Weerd Stella
Rubensheide 61
2080 KAPPELLEN
B R I T I O

x Paul Jacques kaj
Michèle (48, 51, instr.)
t: (16, 96) 28 62 91
ŝ: fot, muziko (gitaro
kaj lernigado)
g: senpage (eĉ familion
ne tro grandan !)

- Wallis P.J.C.
25 London Road
MALDON Essex
CM9 5HN

30740 LE CAILIAR
- Angevin Lucien
r. Lazare Bernard
ŝ: okcidenta movado
kaj pri ĉiu etnismo
ideo.

g: ebleco kampadi ĉe
mi, ĉefe al ekologiem-
uloj (tendo aŭ ruldomo)

31600 MURET

- Le Doaré Thierry
B.211 - 2788
BP.312

46200 SOUTILLAC

- Royer Jean
7 r.Puy d'Alon

64000 PAU

- Lloancy Robert
5 r.Léonard Constant

66160 LE BOUTOU

- Quer Michel
45 r.des Ecoles
(01, emerito)

74000 CRAN ANNECY

- Sire Serge
14 r.de l'Isernon

94260 FRESNES

x Yvon G. kaj Paliot C.
10 a.de la Résidence
ŝ: pac, natuŝismo
g: 2 pers. maks.

N E D E R L A N D O

- H.v. Hulst

V.A.F.

Leidsevaart 238
2014 HE HARLEM
(13, dom-ŝmir.)
t: (23) 325 786
ŝ: esp-o
g: laŭ invito

J A P A N I O

- Unoki takanori
Kyudensyataka 224
Sasi 3820, KARATU
841-01

S V E D I O

- Waynar Carlos
c/o Korint
Stövargatan 26
124 41 BANDHAGEN
- Geist Hj.
Box 4005
122 04 ENSKEDA

Por forlasi Novorossisk mi nepre devas uzi la trajnon, ĉar estas multaj tuneloj kaj nur la fervojo ebligas trairi ilin. Je la 13akaj 30 la trajno alvenas tiel rapide, ke mi havas apenaŭ tempon por adiaŭi kdon K., la fidelan amikon Kapustin Paŭlo. Je 15.45 la trajno atingas Krinskayz, kie mi reakiras mian biciklon kaj miajn pakojn. La suno estas belega. Tial mi sopiras al biciklado post tiuj monatoj da senago. La biciklo funkcias kiel ludilo kaj ebena estas la vojeto, kiu laŭas la trakon. Fora celo : EKATERINODAR -- STALINGRAD. Proksima celo : KRASNODAR. Nura vojo : la fervojo. Aliaj vojoj ? Ne ekzistas ! Foje vojspuroj uzataj de la kamparanoj por loka, surtera "trampado", sekvas la fervojon, sed temas pri sennomaj marĉoj en la nuna sezono. La suno brilas. La vento favoras min, facilas la vojo... Mi rapidas. Je 18.30 mi atingas la stacion de Lunelnaja. Fore malantaŭ mi, la montaro dronas en la ruĝa incendio de la sunsubiro. Mirinda ! ... Adiaŭ Novorossisk !...

Ĉi-nokte fervoja noktogardisto gastigas min kaj rilatigas min kun la esperantista kdo MIRON, ĉe kiu mi estas entuziasme akceptita : teo, babiladoj, freŝa pano, teatra vespero, kamparana ĉeestantaro, almenaŭ 100 personoj, t.e. preskaŭ la tuta loĝantaro de la vilaĝo.

Noto : Vole nevole, nun kaj dum tuta jaro, mi sekvos la fervojan trakon ĝis VLADIVOSTOKO kaj mi vivos la vivon de la sovetiaj fervojistoj kaj jam mi ekprojektas ruliĝi sur la reloj. Por la nuna momento mi provos transformi kaj modifi la etajn aparatojn, kiujn mi elpensis kaj muntis por malhelpi la blokadon de la radoj per la koto. Sed jam de nun ekĝermas en mi la ideo ruliĝi sur la reloj, tial ĉar la tervojetoj estas ne-uzeblij. Mi longe maturigos tiun ideon kaj, je la unua okazo, mi provos realigi ĝin.

Merkredon 17an de aprilo '29 :

Oni ĉirkaŭas min, oni demandas min. Mirinde, kiel ĉiuj estas scivolemaj ĉi tie ! Tiuj kamparanoj havas mirindan animfreŝecon kaj naivecon. Sed kia simpatia etoso ! Neniu fuŝnoto, de la kamparano ĝis la poliestro kaj la fervojistoj. Frateca afableco regas ĉe tiuj vojaĝantoj. Pli malpli bone, kun mia vortaro en la mano mi "jargonas", mi diskutas... Malgraŭ sia ŝajna naiveco tiuj kamparanoj metas al mi sencoplenajn demandojn. Unue, ĉu estas pano en Francio ? La salajroj kaj la vivnivelo ? Kiel reagis la laborista klaso ? Ĉu estas feliĉaj la laboristoj ? Ĉu mi ne timas mian arestiĝon, kiam mi revenos ?

(daŭrigota)

NOVAJ KANZONOJ kaj... ALFABETO

Por la disvastigo de miaj kanzonoj, kiujn mi skribis franc-kaj esperantlingve, mi eksendis partiturojn al ĉiuj gek-doĵ. Ĉar la metodo estas laciga kaj multekosta (pro poŝtmarkoj), la 6 partituroj estis nun senditaj nur al tiuj, kies antaŭlitero de nomo estas A,B,C,D. Sed mi ne povas tiel daŭrigi, kaj mi intencas sendi mian muzikon nur al kiu ĝin petas de mi. Do, se vi mem ŝatas muzikon, aŭ se vi konas orkestrojn, al kiuj plaĉas novaĵoj, skribu al mi pri tio. Tiel vi ricevos senpage partiturojn de miaj kanzonoj, kiuj nomiĝas :
1. Tango kontraŭnuklea - 2. Tango Amoko - 3. Balado pri Ajatolao - 4. Rok'o: Nigr'atom (F kaj E) - 5. Slovo : Somersun' (F kaj E) - 6. Slovo : Bikini.
Mia adreso : TOMEZZOLI, Les Chouettes, La Garenne,
F 71700 TOURNUS

Recenzo : V. Eroŝenko, "Lumo kaj Ombro", 96 p. Eldonis :
Japana Esperanta Librokooperativo, Toyonaka-si, Sone-higasi
1-11-46-204, 561 Japanio. Prezo : 800 enoj.

La blinda E-poeto Vasiliĵ Eroŝenko estas legenda figuro de la fruaj jaroj de E. Li pasigis plurajn jarojn en Japanio kaj Ĉinio (Li instruis E-on en la Nacia Universitato de Pekino) kaj en tiu mondparto aperis liaj artikoloj, poste arigitaj en libroj, kiel tiu ĉi, en kiu la kompilinto, Mine yositaka, republikigas entute "La Ĝemo de unu soleca animo" (1923) kaj aliajn pecojn ĉerpitajn el ĉinaj E-gazetoj samepokaj. Rezultas belaspekta libreto kun plurfaceta intereso : aŭtobiografia peco, poemoj, poeziaj prozaĵoj odorantaj iom romantike, sed ankaŭ ribele kontraŭ la tiamaj maljusto kaj mizero. Ĉar la editoro plejeble fidele reprenis la originalajn tekstojn, ne mankas eraraj aŭ pezaj esprimoj. Tamen tio tute ne malhelpas la leganton, kiu, preter la kelkaj mallertaĵoj, sentas la varmon de sincero kaj homamo. Plia juvelo, kium ni danku al niaj japanaj amikoj !
Kribo

Anonceto : Instruisto, 31-jara, deziras korespondi kun eksterlandanoj (Nederlando, Skandinavio, Bulgario, Hungario...) pri foto, muziko, filatelio, ktp.
Jacques PAUL, 19 lotissement du Minerai, F 22210 PLEMET.

Directeur: Simonet -- Imprimeur: Baudé, 47340 Laroque. CPPAP 58651

V I V O en la E S P E R A N T O - G R U P O J

* E-ista semajno ĉe maro (S E T E) :

De la 16a ĝis la 23a de septembro 1979, la E-Grupo de Montpellier organizis E-semajnon en LAZARET, tre agrabla kaj komforta feriejo en parko ĉe mediteranea maro.

Tre bone preparita, ĝi disvolviĝis en tre agrabla etoso. Ni estis 30 staĝanoj, sed 45 E-istoj ĉeestis la lastan vesperkunvenon. La loko estis bonege elektita, ĉar ĝi donis al ni komfortajn ĉambrojn, manĝojn bongustajn, abundajn kaj diversajn, agrablan parkon, rektan vidon al la maro, eĉ rektan alirejon per tuneleto sub la nacia vojo. Ni povis naĝi, sunbaniĝi ĉiutage krom vendredon ĉar pluvis.

Ĉiuj punktoj de la anoncita programo estis trafitaj. La kursoj gviditaj de s-ro Diez por la komencantoj, kaj de s-ro Lentaigne por la dua- kaj triagradaj kursoj estis regule vizitataj kaj ĉiuj partoprenantoj progresis.

La ekskursoj permesis al la nordanoj ekkoni la akvokulturon kaj la vinberrikolton en Balaruc-les-Bains, la lageton de Thau kun parkoj por ostro- aŭ mitulo-bredadoj, Agde kaj ĝiajn katedralon, muzeon, la kabon-de-Agde kaj multajn modernajn konstruaĵojn, Montpellier kun la bela akvoturo, la panoramo, la belaj ombraj promenejoj, la akvodukto, la fama "Placo de l'Ovo", stratoj, granda magazeno, la ekspozicio pri "Esperanto-Libro" en C.R.D.P., la antaŭromanana "oppidum" de Ensérune kun riĉe provizita muzeo, la bela panoramo de la kampoj strange kuŝantaj kiel kukopartoj, la tunelon de "Canal du Midi", la naŭ kluzojn, ktp.

Ankaŭ la vesperkunvenoj estis interesaj kaj diversaj :

- esperanto-ludoj,
- prezentado de diapozitivoj kaj filmoj pri vojaĝo al U.K. en Varna 1978, pri departemento Herault, pri restado en Grésillon, pri kongreso en Kuopio kun polusa cirklo, pri kongreso en Vieno en 1970,
- teatraĵetoj luditaj de Montpellier-grupanoj,
- prelego kun diapozitivoj de s-ro Fonquerle, kiu estis Internacia prezidanto de la Submaraj Arkeologoj, kaj elkovris en la ŝlimo sub la maro, en Agde, - greka haveno - tre belan antikvan statuon, agnoskitan kiel trezoron, la "Efebo" nun en Parizo (Louvre-muzeo).

La etoso estis amika eĉ frata, kaj la staĝo estis sukcesa.

P.kaj H. FORT.

LAZARET, septembre 1979 :

Ni pasigis unu semajnon en Lazaret, en la urbo "SETE", kune kun geamikoj kaj profesoroj por akiri bonan bazon pri nia E-lingvo.

"Lazaret" situas meze de granda kaj ĉarma parko, kaj tra unu tunelo oni rekte iras de la domoj al la marbordo. Ni havis komfortan ĉambron, varman duŝon, bonan manĝadon. En tiu domo oni akceptas malsanajn infanojn, ne maturajn aŭ paralizitajn.

Matene ni laboris sed tagmeze ni distris, promenadis, ankaŭ vojaĝis ŝipe sur la lageto de "Thau".

Partoprenis komencantoj kaj pli lertaj e-istoj ; la unuaj malfeliĉe parolis tro ofte franclingve. Eble oni povus serĉi solvon pri tio. La etoso estis frata kaj gaja, ni danku la organizantojn. M.G.

* Ĝ I R O N D I O Ĝenerala Asembleo de nia grupo

la 18an de septembro 79 en CENON.

Ni komencis per la agadraporto de la pasinta jaro ; preskaŭ 20 personoj aŭskultis. Pasintjare ni kunvenis 11-foje ; kelkfoje en nia sidejo en CENON, sed plejofte ekstere, en LE CANON, EYSINES, CAVIGNAC (krespoj!), BORDOZO (kun la neperforta movado), en AVIGNON (dum la SAT-Amikara Kongreso), en PEUJARD (Larrat) kaj denove en LE CANON (ostregoj!) - Plie, ni deĵoris budon en la festo de la Socialista Partio en CESTAS kaj en 2 kermesoj : en EYSINES (Amicale Laïque) kaj en BORDOZO (Bordoza Parko).

Ni plözure salutis la naskiĝon de nova E-asocio en GUJAN-MESTRAS. Petro Sevilla klarigis sian sukceson ; ankaŭ li deĵoris E-budon dum la aŭgusta ostro-foiro en GUJAN.

Poste venis la monraporto. Nia kasistino legis monan bilancon. Ni povis konstati la bonstaton de nia konto, kies saldo estas proks. 1600 F.

Daŭrigante kun la monaj aferoj, ni fiksas la kotizon por la jaro 79-80. Tiu ĉi estos 25 F, minimume, por ĉiuj grupanoj. Tiu prezo entenas la abonon al "Laŭte" kiu ĉi-jare kostos 12 F. (Sendu ĉekon al : Groupe Girondin des Travailleurs Espérantistes ccp n° 3477 71 F BORDEAUX).

Pagi estas facile kaj rapide farita afero, sed trovi novan kasistinon estas pli longa laboro. Tamen, post pluraj "mi ne povas", ni sukcesis malkovri novan respondeculinon de niaj financoj ; de nun, pri ĉiuj monaj aferoj, ni rilatos kun

Micheline Demontoux. Sed, ankoraŭ nedecidita restas la respondecul(in)o de nia libro-servo. En Oktobro, ni vidos ; se neniu akceptos la librojn, ni ĵetos ilin en Garonon ! Tiamaniere la E-kulturo diskoniĝus tra la mondo ; estus kvazaŭ verda tajdo !

Aliaj ideoj por propagandi :

- "L'Esperanto, langue internationale, pourquoi pas ?" estas teksto de memglueblaj banteroloj (faritaj de UFE) por la malantaŭa fenestro de la veturilo. Ni ĉiuj konsentis, ke ĝi estos taŭga ilo por propagandi E-on, do la grupo mendos 50 ekzemplerojn.
- Ni povas sendi demandojn al radiofoniaj ludoj kiel "Jeu des 1000 F".
- Ĝis nun, nur Leo metis sian nomon kaj adreson, kiel instruisto por Esperanto, sur la telefon-libron. Sed, en 1980, estos multaj ĝirondiaj esperantinstruistoj en tiu ĉi libro.

Al tiuj esperantistoj, kiuj loĝas ne tro malproksime de la "Muelejoj de la Metilernantoj" (ĉe rivero Creuse, Francio) :

En julio 1979 tri e-istoj laboris kaj instruis en la Muelejo (tiu de Piot, la ĉefa). Al ili Tonton ripetis sian inviton, ke e-istoj organizu konstantajn labortendarojn en Piot kaj/aŭ en la muelejo de Malval, kaj E-kursojn por la centoj da gejunuloj kiuj ĉiusomere venas por labori, lerni kaj amuziĝi tie.

Post konsulto de diversaj E-organizaĵoj kaj e-istoj en Francujo (kiuj ne ĉiuj jam povis pritrakti la demandon kun aprobo kaj kunlaboro), jen nun la demando al vi, junaj kaj nejunaj e-istoj, ĉu vi partoprenus tian laborloĝadon en Piot aŭ en Malval, se ĝi estos organizata. Vin atendus primitivaj tendaraĵ vivkondiĉoj, malhavo de urbaj amuzoj, sed anstataŭe bela natura, ofte bela vetero, amika etoso, instrua kaj permana laboro, kaj evidenta utilo de tiu laboro. Kostoj estos ĉ. 25FF tage (loĝado, manĝado, asekuro, ktp).

Se vi rapide reagos, ni povos fiksi la datojn de restadperiodoj en 1980 kaj plani la laboron laŭ la kompetentoj de la partoprenantoj. Bonvolu indiki viajn kapablojn en manlaboro, instruado de E, aliaj temoj pri kiuj vi povus eduki/instrui, kaj la periodon dum kiu vi povus partopreni. Sendu la respondon al : H. Bakker, Kastelenstraat 231, NL 1082 EG Amsterdam.

(komunikis F. Duchamps ; kompilis Laŭte-red.)

* P E R I G O Z A regiono : Bedaürinde, la "paralela" libro-
 ***** vendejo "Les Fleurs du Mal" en
 Périgueux (Perig~~o~~) fermis siajn pordojn. Sed alia librejo
 akceptas la E-propagandilojn (Jam estas deponitaj "Du rêve
 à la réalité : l'espéranto" kaj "Initiation à l'espéranto")
 Jen la adreso : Librairie "La Mandragore"
 21, rue Limogeanne, F 24000 PERIGUEUX.

* A Ĝ E N I A E - R O N D O *****

 Salle "TOPOL" troviĝas malan-
 taŭ la poŝtoficejo. Salle "TOPOL" n° 10, en
 T O N N E I N S
 Tiu publika kunveno donos al Informkunveno pri Esp-o
 la AERA-anoj ankaŭ la okazon *****
 pridiskuti siajn grup-aferojn kaj fiksi la venonta(j)n
 kunvendato(j)n. Ĝis baldaŭ en Tonneins.

Antoni Madej : "ESPERANTO-GRAMOJ"

Por certo

Ne fartas mi agrable
 Se ion havos mi probable.

Laŭ la vojo

L'aspiro, fascino kaj la konsekvenco
 Jen estas la signoj, per kies potenco
 Ni maŝo, post maŝo post longa lang-voro
 Atingos la celon en gloro.

Pri di-aktivecoj

Ne unu pro aktivoj de Eroso
 Estas inter martelo kaj amboso.

Insultpropono

Se volas vi ofendi esperantiston
 Kurage nomu lin idisto !

Geedzeco

La dramo
 de amo !

Ŝajnas ke, vera...

... geedza interkompreniĝo
 okazas dum la eksedziĝo.